**52** (70) JANUARO/FEBRUARO 1984 ISSN 0150-5823

# Laŭte!

Dumonata kultura informilo k esprimilo esp.
Unu n-ro : 4 FF. Unujara abono kun adresaro : 20FF
Ĝiri al la poŝtkonto 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto:
Cercle amical espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE TIMBAUT

********************************************************************

# POLITIKISTA MEMORKAPABLO

*En mia longa vivo mi plurfoje renkontis ekzemplojn pri forgesemo de ĉiaj politikistoj. Jen estas unu nova.*

*En Francio, kiam regis la Dekstro, la socialista grupo en la Parlamento prezentis sinsekve du leĝproponojn por enkonduko de Esperanto en la programojn de la duagradaj lernejoj. Tiuj proponoj estis unuanime subskribitaj de ĉiuj socialistaj parlamentanoj, inkluzive Mitterrand kaj Savary. En 1981 dum la balotkampanjo, kandidato Mitterrand buŝe kaj skribe promesis, ke li kiel prezidento subtenos ĉiun iniciaton, por ke la leĝproponoj fariĝu oficiala projekto de la registaro, kaj ke la Parlamento ĝin adoptu kiel aplikotan leĝon.*

*Tio vekis entuziasmon en la franca esperantistaro. Oni esperis, ke la estonta leĝo lanĉos duan "francan periodon" en la movado ; ke ĝi trovos eĥon en Italio, kie iam la socialista partio, pli frue ol la franca, estis prezentinta similan leĝproponon ; estis espereble, ke la kontaĝo etendiĝos al Hispanio, al Portugalio, al Grekio sub socialista regado ; kaj ke tajdo en la sudeŭropaj landoj grave influos la Eŭropan Parlamenton*

*en Strasburgo, kie jam anonciĝis kelkaj favoraj iniciatoj. Nun, kion ni konstatas ? Venis la tempomezo de la nova nacia Asembleo kun absoluta socialista plimulto, kaj neniu antaŭsigno pri la leĝprojekto. Mitterrand prezidento forgesis la promesojn de Mitterrand kandidato. Savary, ministro pri nacia edukado, rifuzas Esperanton kaj asertas jenan azenaĵon : "Esperanto estas rimedo por komuniko, ne rimedo por kulturo". Lang, ministro pri kulturo, ignoras nin. Kaj, krom kelkaj laŭdindaj esceptoj, la socialista partio entute mutas pri la temo. La leĝpropono ne nur ne fariĝis leĝprojekto, sed ŝajnas enterigita.*

*Amara konstato, kiu konfirmas mian delongan konvinkon : ni nenion atendu de oficialaj instancoj. Sukcesoj ne falos sur nin kiel de alte paraŝutitaj donacoj, ili estos nur fruktoj de nia baza pacienca penado. Kiam ni estos tiel multaj, ke ni konsistigu almenaŭ sufiĉe pezan malplimulton por influi en balotadoj, kiel jam nun la aliaj verduloj, la ekologiistoj - nur tiam ni komencos interesi la politikistojn.*

*Ĝis tiam ni sciu, ke por rikolti ni devas unue fosi nian sulkon kaj semi.*

***Valo***

---

### *Pri nia tajpilo "JULIA"*

*La jarfinaj reabonoj kaj samtempaj donacoj ebligas anonci al ĉiuj amikoj de SAT-Broŝurservo kaj "Laŭte!", ke la pago de JULIA estas nun tute kompensita per mono afable donacita de multaj gemalavaruloj !*
*Jen do la tria kaj supozeble lasta listo, kiu kronas tiun vere ĝojigan novaĵon. Dankon al vi ĉiuj! Longan, ŝvitoplenan, vivon al Julia !*
*Lj. 3, P.F. 80, P.P. 1000, P.D. 30, R.D. 250, P.S. 100, JL.B. 126,90, H.D. 80, P.O. 100, Anonimulino 100, A.H. 20, N.M. 10, S.G. 50, A.L. 50, H.C. 100, B.W. 150, T.S. 20, J.S. 100, L.M. 25, M.B. 54, W.B. 100, R.C. 50. Nuna listo : 2598,90 + 10227,50 (antaŭe), sume : 12826,40. Pago de Julia kaj de ties akcesoraĵoj: 12632,56. Julia nun ĝuas ŝirmadon per tensiregulilo. Ne reokazis kolapso post la someraj...*

*Kribo*

*1/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/2*






# soleco... emo al soleco...

**Jean-Claude :**

"La homo estas socia animalo", diris iu. La socio estas nepre necesa por persona kreskado. Ĝi estas la fonto, kie homo ĉerpas scion, sperton, utilajn por pluvivi. La familio estas la unua kolektivo, en kiu infano spertiĝas pri socia sinteno. Ĉiu scias kiel gravaj estas tiuj unuaj jaroj. Se dolorige travivitaj, ili povas finvenigi al solecemo. Do soleco estas ŝirmo kontraŭ socio preme sentita, aŭ malakcepto fare de ĉi-lasta. Se la izoliteco estas absoluta, aperas risko pri gravaj sekvoj : toksiĝo, malsano, eĉ ĝis frenezo, krimo, memmortigo, ktp... Por ke solul(in)o serene aŭ ne tro mizere vivu sian staton, necesas ke ŝi/li trovu okupon ŝin/lin ligontan kun ties medio. Ĉar la vivo konsistas el rilatoj. Kaj profesio, krom vivtena utilo, ĉefe estas - devus esti- la rimedo, per kiu estulo sin esprimas kaj sin sentas partoprenanta en la komuna kontentiĝo.

***Lilia :***

*Soleco : 1) signo de persona malkapablo kaŭzita de psikologiaj malsanstatoj aŭ 2) maljusta puno/plago naskiĝinta el tuta aro da cirkonstancoj sendependaj de la individuo mem.*

*Tiaj konceptoj suferigas la solulon kaj akrigas kontraŭ li la sociemulojn. Tamen, la ĉi-supra dubranĉa difino kuŝas nure sur antaŭjuĝo.*

*Fakte, la homo estas socia animalo, sed ne pli ol ĉiuj aliaj vivantaĵoj - vegetalaj aŭ animalaj. Eble nur alie. Ĉiu surtera specio konas momentojn de kunvivado, ĉu intermita kun, ekzemple, specifaj reproduktiĝceloj, ĉu longdaŭra dank'al tuta vivorganizado, kiel tiu de la abeloj, ĝuste.*

*Ĉe la homo politiko kaj ekonomio (i.a. "raciaj" faktoroj, kiel avideco je povo, ambicio, ktp) pligrandigis la sociiĝemon kaj la sociigadon. Konsekvence, oni persekutas, marĝenigas kaj kritikadas tiun, kiu ne centprocente kunlaboras kun la "ĝeneralaj" interesoj de sia socio kaj medio, des pli kiam liaj personaj interesoj ne kongruas kun la "ĝeneralaj" interesoj - kaj interezoj-fontantaj el ĉies deviga partoprenado.*

*Tiucele prizorgeme laboras ĉiuspecaj varbiloj : amaskomunikiloj kun la plej diversaj influpropagandaĵoj kaj instigo al larĝskala konsumado, sloganoj pri fortunuiĝo kaj solidaro, psikologiaj karakterkuracadoj - kaj ceteraj gurdiloj funkciantaj ĉe kaj por ĉiuj tavoloj de la sociordo, inter kiuj la familia.*

*Nu, ĉiu el ni estas ja simple individuo, t.e. aparta estaĵo. Eĉ se ni estas plej "normalaj" laŭ sinteno, penso- kaj sentomaniero, nia persona "kunfandiĝo" kun alia(j) estaĵo(j) nur foje montriĝas perfekta kaj absoluta. Same kiel ĉiu havas sian propran karakterizan subskribon aŭ fingromarkon, tiel ankaŭ ĉiu homo posedas apartan "ritmon" - korpan, mensan, animan, kie ajn ĝi troviĝas. Kaj ĉu iu kapablos nei, ke ĉie, en ĉiu grupiĝo elstaras "kapoj", t.e. individuoj kun specialaj kapabloj, individuoj sen kiuj ties grupoj eĉ ne ekzisteblus. Krome, la plej sociemaj individuoj spertas kiel penige kaj malofte okazas vera "interkompreniĝo" kaj "komuna agado".*

*Mi bedaŭras, sed tiu, kiu ne serĉas iagrade solecon por intima, ĝisosta interkonatiĝo kun si mem, fariĝis fakte alienulo, ne meze de la socio (des pli bone por ĝi !) sed rilate al si mem, nude kaj krude, karne kaj oste, rilate al sia homa unuo, al sia indeco natura.*

*La socion, la historion, la evoluon konsistigas la homoj, granda kvanto da homoj, kiuj ja devus konscii pri sia aparta kaj elstara vivo (tio ne signifas originala, revoluciema aŭ sensacia!) por povi fakte gustumi kaj sociemon kaj solecemon aŭtentike.*

*Ne temas ĉi tie pri instigo al utopia serĉado de la ĝusta mezo, sed pri justa valorigado de la solecema*



*homparto, multe malpli artefarita ol la sociema.*

*Rilate al la Esperantistoj, tiuj plej "originalaj" kaj "ekstravagancaj" homoj, mi emas diri ne ke ili disiĝas de socia vivo, sed ke ili havas apartan koncepton pri sociordo : la intereson de sia ĉiutaga, ĉirkaŭa medio ili parte aŭ tute anstataŭigas per tiu de tutmonda, larĝskala komunumo (kun ĝiaj respektivaj politikaj, ekonomiaj kaj ceteraj faktoroj...) ĝuste ĉar la ĉi-supre citita medio ankoraŭ ne esperantiĝis...*

*Ĉiamaniere, ĉu oni kompensu periodojn de soleco per vizitado de dancejoj, sportkluboj aŭ kongresoj, ĉiam aŭ temp-al-tempe (kaj tion oni faras, eĉ kiam oni ne vivas nek laboras izolite...), tio ne montriĝas fundamente malsimila - ĉar, fine, ĉiuj homoj verdire sopiras antaŭ ĉio (laŭŝajne) al nekonfesita, "homosvarma soleco".*

**Ĝiz el Lamark :**

Laŭ mi, la malo de **solo** estas **kuno**, dum la malo de **soleco** estas **komuni(k)o.**

La solo povas malfaciligi la vivon de estuloj malfortaj kiaj ni estas ; sed dum oni estas sana kaj kapabla akiri sen alies helpo vivrimedojn, oni ja povas ĝui senĝenan solvivon en preskaŭ perfekta libereco.

(Kiam oni vivas en socio, bona mens-izoliĝo povas doni relative vastan liberecon ankaŭ en svarmanta hom-amaso ; sed ĝi ne estas senriska, ĉar la nepriatentata ĉirkaŭaĵo povas fariĝi tre danĝera loko!)

Komunio estas esence spirita komuniko, sento de komuneco kun io aŭ iu. Ankaŭ la soleco estas sento sed pri manko de tia komuniko.

Oni eble povus nomi ĝin "korsoleco" : mistikuloj povas vivi en plena solo sed en komunio kun la Naturo aŭ kun Dio, do korfeliĉaj kiel homo povas esti tia. Kontraŭe, oni povas suferi de (kor)soleco ankaŭ en sia propra familio aŭ komunumo : multaj psikotoksitoj **ne** estas soluloj, same pri alkoholistoj kaj memmortiguntoj (kiuj volus sin mortigi, sed ne kuraĝas).

Cetere, mi scivolus, kiom da psikotoksitoj troviĝas inter la aktivaj Esperantistoj. Ĉu eble neniom ? Tio ja estus bona pruvo, ke Esperanto estas "la" lingvo de monda komuniko !

***Ĵansebo :***

*Por mi, kapablo de sola vivo fronte al si mem donas tutan mensan sendependecon. Ĝi estas atinginda idealo.*

*Aliflanke, multaj homoj pretendas, ke ili preferas solecon, nur ĉar ili havas malfacilaĵojn por komuniki kun la aliaj kaj plene ĝui tiujn kontaktojn. Mi mem estis tia, kiam mi estis pli juna.*

*Do oni rajtas paroli pri emo al soleco, nur kiam oni povas libere elekti ĝin.*

*Nevolita soleco havas du kialojn :*

*- psikologiajn problemojn ;*

*- mankon de renkonteblaj personoj en ies ĉirkaŭaĵo.*

*Ambaŭ aferoj estas ligitaj : kiam oni psike misfartas, oni malfacile faras renkontojn. Kiam oni ne povas renkonti amikojn, oni havas problemojn. Estas sorĉa rondo : la aferoj iĝas pli kaj pli bonaj... aŭ pli kaj pli malbonaj.*

*Bedaŭrinde, kiam malbonas, la socio ne helpas nin retrovi la ekvilibron. Ĉar ĝi ne ŝatas la soleculojn. Ĉu vi iam provis iri sola en restoracion aŭ dancejon? La aliaj personoj malfide rigardas vin, kvazaŭ ili pensus : "Kial li estas sola? Ĉu neniu volas esti kun li ? Kial ?...ktp".*

*Krome, la estraro ne ŝatas, ke homoj renkontiĝas. Tio estas "subversa". Ĝi ne favoras la asocian movadon nek komunikadon (escepte al aŭ el si mem), nek liberajn radiojn, nek...Esperanton!*

*Post '68, renkontoj estis pli facilaj, sed iuj troigis kaj malfido aperis inter nekonatoj. Estas bedaŭrinde.*

*Por mi la idealo estas 1) vivi en medio, kie la renkontoj estas facilaj, 2) ami min mem por scipovi ami la aliajn kaj helpi ilin, 3) elektadi libere inter soleco kaj malsoleco, kiam mi deziras.*

**Jakelino :**

## Soleco en malliberejoj

Inter la aktivadoj, kiuj donas al mi la iluzion esti utila, estas la korespondado kun malliberuloj. Jen citaĵo el letero sendita de malliberulo de Fleury-Merogis. Mi precizigas, ke :

- tiu letero datiĝas de antaŭ majo 1981 (sed mi dubas, ĉu multo ŝanĝiĝis en la taga vivo de arestejoj);
- Fleury-Merogis estas "modela" malliberejo.

Nu, jen kiel oni vivas en "tristela malliberejo":

"Mia karcera vivo resumiĝas je malmultaj aferoj, mi estas rakontonta al ci tagon. Ci sciu, ĉiuj similas unu al la alia en malliberejo, neniam estas ŝanĝo. Matene je la 6a kaj 45 minutoj ĝenerala vekiĝo; 7a : matenmanĝo, t.e. kafo kun nura pano ; poste purigado de la ĉelo ; 8a : promenado ; 9a kaj 30 minutoj : reiri al la ĉelo, kie mi estas sola, kaj, en la ĉelo, rondiro, kiel oni povas rondiri en ĉambro 2 metrojn larĝa 3 metrojn longa ; ankaŭ legado, ĉar tio estas forsaviĝo per la penso ; 13a : tagmanĝo, poste varma akvo por tiuj, kiuj povas aĉeti solveblan kafon, sed tio ne koncernas min, ĉar mi havas nenion, nur la minimumon ; poste leteroj, sed ĝis nun ankaŭ tio ne koncernis min ; je la 13a kaj 30 minutoj, promenado ĝis la 14a kaj 30 minutoj; la korto estas sufiĉe granda, oni povas rondiri dum la tuta promenado, aŭ ludi per kartoj ; poste reiro al la ĉelo, kaj nenion fari ĝis la vespermanĝo, je la 17a kaj 30 minutoj, tio ne estas amuza, post la vespermanĝo oni enlitiĝas kaj aŭskultas la radion.

Tie ĉi ni eĉ ne rajtas kuniĝi duope aŭ triope en ĉelo por kune trinki kafon. Estas aliaj reguloj en malliberejoj por longaj punoj. Sed tie ĉi en arestejo la disciplino estas pli rigora : unu duŝo semajne (10 minutoj), 3 horoj da promenado tage, 3 libroj de la biblioteko semajne, kaj unu filmo ĉe la kinejo, dum la cetera tempo oni estas enŝlosita, sola en ĉelo."

Al tiuj, kiuj emas filozofiumi pri la neceso respekti la leĝojn de la socio, mi demandas : ĉu 21 horoj da soleco tage estas racia maniero por helpi al kulpinto retrovi lokon en la socio ?

Komence mi provis membriĝi ĉe Auxilia kiel instruisto de germana lingvo. Auxilia estas privata asocio, kiu organizas perkorespondajn kursojn por malliberuloj kaj korpaj handikapuloj. La informilo pri tiu asocio menciis, ke ĝi estas katolika, sed ke ĝi akceptas nekatolikojn. Se oni havas problemojn pro la katolikeco de la asocio, oni ne hezitu sincere skribi tion. Do mi sendis leteron, en kiu mi klarigis, kial mi forlasis la katolikan eklezion. Oni respondis al mi, ke pro miaj anarkistaj konceptoj mi verŝajne ne sentos min komforta en la medio de Auxilia. Ekzistas oficialaj asocioj de vizitantoj de malliberuloj. Sed mi timis, ke ankaŭ tiuj ne akceptas anarkistojn. Do mi aĉetis gazeton "Libération", kaj respondis al pluraj anoncetoj de malliberuloj, en diversaj malliberejoj.

Tio okazis antaŭ pluraj jaroj, nun mi ne plu havas malliberajn korespondantojn, ĉu ĉar ili ne plu skribas al mi, ĉu ĉar ili estas nun liberaj. Miaflanke, la bilanco estas, ke verŝajne mi denove aĉetos "Libération" por trovi aliajn anoncetojn. Mi povas nur instigi la francajn legantojn de "Laŭte" aĉeti tiun gazeton (reklamo senpaga) kaj korespondi kun malliberuloj. Tamen estu prudentaj!

- plej ofte, tiuj homoj faris deliktojn aŭ krimojn, ĉar ili jam havis malstabilan psikon. La vivo en malliberejo ne kuracas ilin. Do iliaj reagoj estas surprizaj. Mi ricevis amdeklarojn kaj insultleterojn, foje de la sama korespondanto en la sama monato. Mi ricevis ankaŭ edziĝpetojn, verkitajn pro jena motivo "ci devas ami min, ĉar ci estas la nura virino, kiun mi konas".

- mi malkonsilas al junaj fraŭlinoj korespondi kun viraj malliberuloj. Mi supozas, ke gemonaĥoj eltenas la mankon de seksaj rilatoj, ĉar tiun vivon ili mem elektis, kaj ĉar ili kompensas per intensa spirita vivo. Sed malliberuloj ne estas monaĥoj, ankaŭ malpli anĝeloj. La foto de la korespondantino estas utila por faciligi la masturbadon. Ĉe multaj, tio kondukas al la certo, ke post la liberiĝo oni havos knabinon por onin atendi. Do oni riskas malbonajn surprizojn, kiam la korespondanto liberiĝas. Al mi neniam okazis tio : mi elektis malliberulojn, kiuj ne estis tuj liberigeblaj, do mi havis tempon por precizigi la aferon, kiel mi ĝin konceptis. Okazis, ke malliberulo ĉesis skribi al mi, kiam li komprenis, ke mi neniam konsentos sendi al li amleterojn.

- alia problemo estas la hipotezo, ke liberigita korespondinto venus al mi por diri : "Jakelino, mi ĵus atakis bankon, ĉu ci povas min kaŝi?" La problemo ankoraŭ ne metiĝis al mi. Kiam korespondanto estas baldaŭ liberigota, mi precizigas, ke mi diros al la polico ĉion, kion ĝi demandos, kaj ke estas tasko lia zorgi, ke mi ne sciu pli, ol mi povu diri. Banditoj havas sian propran etikon, ili komprenas tion, kaj mi neniam estis en embaraso.

Mi ĉesis korespondi kun malliberuloj, kiam mi ekkonsciis, ke la ĉefa problemo estas la liberiĝo. La vivo en malliberejo ne estas amuza, sed oni bezonas nur atendi la supon. Sed, kiam oni liberiĝas, oni denove devas fari decidojn, serĉi laboron, ktp. Ju pli longa estas la puno, des pli malfacila estas la reiro en la socion. Mi iam legis, ke laŭ psikiatroj homo, kiu estis mallibera dum pli ol 15 jaroj ne plu kapablas adaptiĝi al socia vivo (noto por svedoj : jes, oni povas pasigi 15 jarojn en malliberejo, tio ne estas eksterordinara en Francio). Nu : mi ne disponas pri laborpostenoj, kiujn mi povus doni al malliberuloj kaj mia kapablo finance helpi estas limigata per la malgraveco de

(fino sur p. 9)





# VORTOJ DE MALJUNULO

----
valo
----

## ĈU DORMI ?

*Franca proverbo : Juneco maldormanta kaj maljuneco dormanta proksimiĝas al morto.*

*Nu, mi estis junulo maldormanta, kaj la morto ne degnis kapti min ; mi estas maljunulo dormanta, kaj la morto ne hastas akcepti min.*

*Dum mia juneco mi dormis po 4 horojn ĉiunokte. Tio sufiĉis, ĉar mia dormo estis bona, ripoza, ripara. Dum la tuta tago mi estis vigla, neniel dormema.*

*Nun mi restas pli longe en la lito, sed mia dormo ne estas tiel efika. Matene, ofte mi vekiĝas laca, kaj dumtage mi kuntrenas dormemon ; mi sopiras al reenlitiĝo. Ĉu aspiro al lasta eterna ripozo ?*

*Ne, fulmotondro ! Mi asertas, ke la homa naturo ne estas mortemo, sed vivemo ; ne dormemo, sed agemo. Vekiĝu, maljuna pigrulo ! Skuu cin ! Vipu la malpeneman ŝarĝobeston ! Al ci restas malmulte da tempo : urĝe uzu ĝin agante. Ci povas malmulte ? Jen estas plia motivo por streĉi cian kadukan forton kaj peli ĝin ĝis ĝia limo.*

---

mia salajro. Sed antaŭ kelkaj tagoj, iu el miaj korespondintoj telefonis : li laboras kiel fenestrolavisto, la laboro plaĉas al li, ŝajne li estas kontenta pri sia vivo. Mi metis al li la demandon, ĉu korespondado estas reale utila dum la tempo de la mallibero. Li respondis, ke tio helpas. Do mi verŝajne rekomencos.

(fino de tiu ĉi debato)

# ĈU KROKODILI ?

*Iuj samideanoj trovas neutile kaj iom ridinde paroli Esperanton inter samlandanoj. Ili diras : "Esperanto estas lingvo internacia. Ni do rezervu ĝin por la internaciaj rilatoj. Hejme ni parolu nacilingve, imite al Zamenhof, kiu en sia familio kutime parolis pole."*

*La rezonado ŝajnas ĝusta. Sed, fulmotondro! kiom el ni ofte renkontas alilandanojn ? Se ni ne ekzerciĝas inter ni, kiel ni progresos en la praktiko ? Kutimiĝinte je krokodilado, se iam ni troviĝos en internacia medio, ni scipovos apenaŭ balbuti "bonan tagon" en nia nacia tono kaj akcento.*

*Sed, obĵetos iuj, parolante inter samnacianoj, ĉu ni ne kulturos tiujn misajn naciajn karakterojn, kiuj distingigos nin ? Jen estas ja pripensinda argumento. Oni povus eĉ timi, ke nia lingvo, naciskale uzata, evoluus al dialektiĝo. (Mi konis francajn esperantistojn, kiuj diris "se!" anstataŭ "jes ja!", kaj germanajn, kiuj diris "do!" en la sama senco.)*

*Mi respondas :*

*Unue, en ĉiu loka grupo devas esti almenaŭ unu sperta esperantisto kapabla korekti la fuŝajn tendencojn de komencantoj. Tiuj ĉi ne timu paroli, eĉ kun siaj eblaj difektoj, kaj la spertulo ne heziti ĉiufoje signali la eraron kaj indiki la ĝustan vojon.*

*Due, la moderna tekniko provizas nin per efikaj rimedoj por akiri ĝustan tonon kaj akcenton : nome diskoj kaj kasedoj, en kiuj estas registrita la voĉo de bone parolantaj esperantistoj. Tiujn rimedojn ni uzu en kursoj kaj grupkunvenoj. En tiu ĉi fino de la XX-a jarcento, proksime al la centjara jubileo, ni estu homoj de nia epoko. Tiel ni lernos flue paroli, "laŭte, kuraĝe kaj elegante", kiel diris Andreo Ĉe. Kaj ni akiros eksternacian parolkapablon, tiel kompletigante la moton de Lanti : "Ni kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo."*

***Valo.***

---



PRIPENSOJ PRI

# ekonomikaj problemoj




*Kial per Esperanto pritrakti tiujn problemojn ? Unue por informi la esperantlingvanojn pri kelkaj realaĵoj, sed ankaŭ por provi kune trovi universalajn proponojn de tiu internacia depresio, tiel nomata ekonomika krizo. Kiu krizo ?*

*Nian nuntempan socion regas kapitalisma sistemo, liberala en niaj landoj, ŝtatsocialisma en aliaj. Tiu krizo, malsimile aspektante laŭ la diversaj politikaj reĝimoj, laŭ la ekonomikaj situacioj aŭ laŭ la kutimoj, radikas en la strukturo de nia produktada kaj konsumada organizo. Fondita sur la porprofita interŝanĝo, la kapitalisma sistemo disvolviĝis dank'al sia dinamiko. Laŭ la leĝo de ekvilibro inter oferto kaj mendo, malabundeco akcelas produktadon kaj abundeco akcelas konsumadon. La entreprenoj maksimumigas la profiton :*

- *altigante la vendprezon ;*
- *plimultigante la produkton ;*
- *malaltigante la plenkoston.*

*La konsumanto prefere aĉetas malmultekostajn varojn, akcelas la du lastajn punktojn. Rezultas ĉiam pli granda produktiveco, ĉiam pli granda produktado. Dum la pasinta jarcento, la produktado de la industriaj landoj duobliĝis, denove duobliĝis dum la unua duono de nia jarcento. Inter 1950 kaj 1980 la produktado kvarobliĝis.*



Konsidere al la demografia kresko, tio signifas, ke en 1983 ni konsumas duoble pli ol en la jaro 1963, tamen malpli laborante. Kelkaj ekzemploj :

| laborhoroj por akiro de | en 1925 | hodiaŭ |
|---|---|---|
| fotilo | 106 | 6 |
| polvosuĉilo | 500 | 34 |
| fridaparato | 3600 | 80 |

Ekde la pasinta jarcento
- la labordaŭro trioniĝis,
- la pohora produktiveco tridekobliĝis,
- la pohoma konsumado dekobliĝis.

**Kiu krizo ?**

Ĉu tiu disvolviĝo ekzistas por la feliĉo de la homaro? Tute ne! Tio estas determinismo de la kapitalismo. Kreskadi aŭ morti! Uzante modernan teknologion, oni produktas pli da varoj per malpli da laboristoj. Se nia konsumado ne kreskos samritme kiel produktiveco, tiuj laboristoj ne estos dungitaj por fabriki aliajn varojn. Ili mem, perdante sian aĉetpovon, malpli konsumas, do senlaborigas aliajn personojn ktp... Eĉ se niaj bezonoj estas kontentigitaj, tiu sistemo devigas nin konsumi por labori.
- En 1783, oni serĉis proletojn, ĉar ekzistis laboro.
- En 1983, oni serĉas laboron, ĉar ekzistas proletoj.

Estus pli simple malpliigi la labordaŭron, sed ni vidos, ke la cirkonstancaro, laŭ kapitalismo, malebligas tiun solvon. Antaŭe, ni devas klarigi du ĉefajn punktojn, du ligitajn problemojn : inflacion kaj senlaborecon.

**Kio estas inflacio ?**

Multe oni parolas pri la konsekvencoj sed neniam pri la kaŭzoj. Kulpis la altiĝo de petrolprezo, nun kiam petrolo malpli kostas kvankam inflacio pludaŭras; kulpas la dolaro. Eĉ oni plezure konfuzigas la homojn pri la konceptoj de plikostiĝo kaj inflacio : du malsimilaj fenomenoj de la sama sorĉa cirklo. Kiel klarigi la pligrandiĝon de la prezoj, kiam la plenkosto ĉiam malpliiĝas ? Pri tio kulpas la profito ; (bonvolu legi "La parabolo pri la cisterno" de E. Bellamy). Efektive, kiam la plenkosto valoras 5 (tion ricevas la laboristoj), la profituloj vendas 6 ; diferenco estas profito. Sed kiel vi povus aĉeti 6, kiam via salajro valoras nur 5 ? La aĉetpovo de la laboristoj entutiĝas nur 5 sesonojn



de la produktado. Profiti signifas vendi la lastan sesonon, sed al kiu ?
- eksterlanden, proponas la naciuloj, sed kapitalismo, pli antaŭtempa ol niaj politikistoj, ne zorgas pri landlimoj. Ol tiun devizon "Enlande ni fabriku" preferu "Utile ni konsumu".
- al novaj beboj, proponas la naskigistoj. Tiom pli malbone, se post 20 jaroj ili estos senlaboruloj, des pli malbone se nia porviva spaco foriras, se polucio nin mortigos, se energio mankos, se ni militos...
- al pagontoj, proponas multaj vendistoj. Ĉu vi ne jam profitis "senpagan krediton" ? Vi ricevas varojn, poste vi pagos. Retroiri por pli bone fali.
- Ne! Por vendi la produkton koncerne la profiton, la kapitalismo devas krei monon. Tio estas inflacio. Por ne bankroti kaj ĉefe por kontentigi la apetitegon de armilvendistoj, la "Moratorio" de 1914 ebligis kreadon de mono sen perora kompenso. Ekde tiam, mono estas nur pagilo. La monkvanto kreskas pli rapide ol la produkto, do la dispartigo sur ĉiu konsumaĵo grandiĝas. Tiam altiĝas la prezoj. Redukti inflacion signifas senlaborigi la monklisaĵon, konsumbridadi aŭ senlaborigi la homojn. Male, redukti senlaborecon signifas liberigi la produktadon kaj konsumigi homojn, ekzemple per kredito, signifas ebligi monfabrikadon. La celo de niaj politikistoj limiĝas tolereble ekvilibrigi inflacion kaj senlaborecon.

**Kio estas senlaboreco ?**

Ĉirkaŭ 10% el la laboristoj senlaboras. Tio signifas 35 milionojn da senlaboruloj en la industriaj landoj (en socialismaj, senlaboreco oficiale ne ekzistas). Sed oni kalkulas nur la enskribitajn ; multe pli da laborpovantoj ne estas salajrataj. Hodiaŭ nur 40 % el la popolo estas dungitaj.

**Rolo de la armeo por savi kapitalismon**

Oni ne povas analizi tiun krizon sen retroiri antaŭ duonjarcento. Post la unua mondmilito, la kapitalismo prosperas, kiel ni tuj klarigos. Ju pli longa kaj detrua estas la milito, des pli mizera la popolo, des pli grandaj la bezonoj, des pli multekostaj la varoj. Tiuj cirkonstancoj idealaj por la disvolviĝo de la kapitalismo naskas des pli prosperan ekonomion, ke la milito akcelas novan teknologion, pli produktivan, anstataŭante la manlaboron dank'al maŝinoj. Maldungitaj, la senlaboruloj

perdas sian aĉetpovon ; la varoj fabrikitaj de la maŝinoj amasiĝas pro manko de aĉetantoj. La superprodukto (aŭ subkonsumado) bremsis tiun prosperon. Dum kelkaj jaroj, 43 milionoj da senlaboruloj kaj ties familioj mizeriĝas. Simpla solvo konsistis en la disdono de la superproduktaĵoj inter la bezonantoj kaj en la dispartigo de la utila laboro inter salajruloj kaj senlaboruloj. Tio signifus finon de la kapitalisma sistemo. Niaj karaj administrantoj preferis bruligi rikoltojn, konservi loĝejojn malplenaj, detruigi produktaĵojn... Fronte al nekompetentaj politikistoj (pleonasmo), landoj ekspertis maldekstran registaron (Hispanio, Francio en 1936 kiel en 1981) aŭ suferis pro faŝismo, lasta remparo de la kapitalismo (Mussolini, Hitler, Pétain, Hiro Hito, Stalin, Franco, Salazar...). Tiuj estroj agis komune per plenpovoj al milito. Senlaboruloj rapide estis dungitaj en armila industrio... Bilanco de tiu krizo:

- 1932 : 43 milionoj da senlaboruloj
- 1942 : 60 milionoj da soldatoj
- 1945 : 40 milionoj da mortintoj

kaj abunda laboro por la aliaj.


**La milito : ĉu FATALECO ?**

Ĉiu scias pri la nekonfesita celo de la armeo kiel rompanto de laboristaj strikoj dum la plej danĝeraj konfliktoj, kiel batalanto kontraŭ ribela malamiko. Ni daŭrigu tiun ĉi analizon laŭ la ekonomika vidpunkto. Kiam la popolo mizere vivas, tiam la pligrandiĝo de la salajro utilas por la nutrado, la loĝado kaj vivigas la entreprenojn, sed hodiaŭ, kiam preskaŭ ĉiuj havas loĝejon, televidilon, veturilon... limigita estas la kreskado. Pro tio, politiko rekomendita de Keynes, hodiaŭ ne plu taŭgas. La kapitalismo estas tiel prospera kiel mizera estas la popolo.

La armeo en tia krizo havas du ĉefajn rolojn :

- Unue ĝi laborigas soldatojn kaj laboristojn (pli ol 30 milionojn en la Mondo)
- Due, fore de la humanistaj paroladoj pri timiga malkonsilo, armiloj estas uzataj. Kiam la ruiniĝo esperigas plurjaran prosperon, kiam sufiĉe da senlaboruloj mortis por Patrio, ĉesas buĉado. Ĉu ni ankoraŭ miru pri cikla karaktero de la ekonomiaj krizoj ?






Fakte, la kapitalismo ĉiam celas prosperi en malabundejo. Ĝia lasta grandaventuro estis la dua Mondmilito. Hodiaŭ pli inside, ĝi malabundigas tutan Mondparton.

**La problemoj de la Tria Mondo**

En 1980, la Eŭropa Ekonomia Komunumo eksportis al la Tria Mondo 7 miliardojn da dolaroj per nutraĵoj, dum Eŭropo ricevis de tiuj malriĉaj landoj 19 miliardojn da dolaroj per aliaj nutraĵoj. La landoj de la Tria Mondo nutras nin, pro tio malriĉiĝas. Certe ja kelkaj landoj interalie Francio aŭ Usono kompensas, vendante armilojn. Pro malbona nutrado, pro analfabeteco, pro nehigieneco, oni diras, ke la Tria Mondo ne kapablas vivteni, pagi siajn ŝuldojn. Rigardo super tiu merkato dubigas nin, pri kiu ŝuldas. La landoj sur la "disvolviĝa vojo" (oni povus precizigi "sur malbona vojo al disvolviĝo") devas intensigi monokultivaĵojn malprofite al la grundokvalito. Tiuj kultivaĵoj estas uzataj por nutri nian buĉan bestaron, kies varmeca kaj vitamina rendimentoj malefikas.

La helpo al la Tria Mondo estas nur profitema helpo, kiu ne solvas la bazajn problemojn (malsaton kaj analfabetecon). Tiu helpo estas nur asisto, kiu ĉiam pli diferencigas riĉajn kaj malriĉajn landojn. Tio ebligas al la unuaj trovi malmultekostan manlaboron, krudajn materialojn, energion kaj precipe amason de kontentigotaj bezonoj, elirejon por vendi superproduktaĵojn. Kiam tiu kapitalista kaj mona subpremo ne tiel bone funkcias, por mizerigi la popolojn okazas milito inter malriĉaj landoj (Hindoĉinio, Vjetnamio, Kamboĝo, Libanio, Ĉado...) La plej riĉaj landoj (Usono, Sovetio, Francio, Britio...) vendas armilojn por ebligi tiujn militkonfliktojn.

Sammaniere, pro malegaleco, laboristaj migradoj okazigas konfliktojn kiel rasismon, malsimilecon de la salajroj, miskomprenon pro lingva barilo. Pluraj dekstruloj rilatigas la nombron de gastlaboristoj kaj la nombron de la senlaboruloj, dum la gastlaboristoj faras la plej aĉajn laborojn, la malplej bone salajratajn...

Kiam la tutmonda produktado sufiĉas por ĉiujn nutri, loĝigi...la problemo ne plu konsistas en pli granda kresk-


ado ol la aliaj, sed nur en egala dispartigo de tiu produktado. La nuna krizo, kiel post 1929, naskis maldekstran eksperimenton. Socialistaj partioj venkis en 1981 en Francio kaj Hispanio kiel la "Popola Fronto" en 1936. Fakte, vera socialismo ne ekzistas en kapitalismo. Ĝis nun, neniu lando sukcesis konstrui socialismon. Tiu granda pasinta krizo kondukis al milito la plej murda, kaj denove nia ekonomia socio prosperis ĝis 1965-1970, kiam denove aperis krizo pligravigita per la kvarobliĝo de la petrolprezo en 1973.

| | | | |
|---|---|---|---|
| | → 1920 | → 1960 | kreskado |
| | 1929 | 1973 | krizo |
| | 1932 | 1978 | senlaboreco |
| | 1936 | 1981 | "socialismo" |
| 1914 | 1939 | ? | faŝismo kaj milito |






Konferenco
"Nordo-Sudo"



Malgraŭ la daŭrigo de la studado, malgraŭ la militservo, malgraŭ pli kaj pli frua emeritiĝo, depost 1965, senlaboreco duobliĝas ĉiun sesan jaron. Kiu estos la konsekvenco de nia nuna malinteresiĝo ? Tiu ĉi teksto ambicias helpi la rompiĝon de la sklerozigа pasiveco de 4 miliardoj da pacistoj.


Kiu solvo ? Ĝis nun, granda kreskado (meze 5% ĉiujare) inter 1950 kaj 1980, la produktado de la industriaj landoj kvarobliĝis. Ĉu niaj bezonoj tiel kreskas ? Kiuj estas bezonoj ? Ni ne povas elekti ; la produktiveco, kiu ne utilas al grandiĝo de la konsumado, estas malŝparo aŭ senlaborigas homojn.

Kompreneble, kiam laboristojn anstataŭas maŝino produktanta pli multe kaj pli rapide, eĉ aŭtonome kiel roboto, la laboristoj maldungiĝas. Simpla solvo estus malpliigi la labordaŭron. Tio okazis en Francio post la venko de la socialista partio ; redukto de la laborsemajno ĝis 39 horoj ebligis dungi apenaŭ 20 OOO laboristojn (malpli ol 1 % el la senlaboruloj). Se redukto al 35 horoj liberigos la salajrulon, ĝi konsekvence ne solvos la problemon de senlaboreco. Kial ? En la plimul-

*taj entreprenoj oni jam laboras malpli ol 35 horojn, kvankam oni ĉeestas la laborejon dum 40 horoj aŭ pli. Se ĉiu laboristo rajtus sin liberigi post la fino de sia tasko, ni ne plu vivus en laborcivilizacio. Tiel, ĉeesti 35 horojn ne ŝanĝos la laborkvanton, eble eĉ plibonigos ĝin, unue pro malplia laceco, due ĉar redukto de la labortempo ofte okazigas aŭtomatiĝon de iu sektoro. Tiel, ke produktado tute ne malpliiĝos proporcie kun labortempa redukto. Tio ne profitdonos al la senlaboreca nivelo, eĉ malprofitigos, ĉar mastraro kutimigas konsenti al ni partigon de la salajro dum partigo de la laboro, do konsenti redukton de la aĉetpovo, kiam eble tiuj laboristoj tiom produktos kiom hodiaŭ*

*- sama produktado*
*- malpli da aĉetpovo* } → *superproduktado* → *senlaboreco*

*Ju pli oni malrapidigos la redukton de la labortempo, des pli oni gravigos la problemon de senlaboreco.*




**Redukto de la labordaŭro**

*En alia organizo, en kiu homoj laboras ne por kapitalista profito sed nur por siaj bezonoj, certe oni malpli laboros, sed kiom da liberiĝo oni povas esperi ? Por tion scii, oni devas konsideri plurajn faktorojn :*
*- iuj laboroj estas malutilaj (kiel armeo)*
*- iuj laboroj estas neutilaj (ĉefe en la terciara sektoro)*
*- parto de niaj konsumaĵoj estas nur malŝparo (detruado kaj rekonstruo, malsaniĝo kaj resaniĝo, poluado kaj malpoluado...)*
*- iuj sektoroj povas esti robotigitaj (ne hodiaŭ, pro senlaboreco)*
*- parto el la salajrata laboro povas esti libera laboro*
*- pli da homoj povos partopreni la produktadon (eble 60 % anstataŭ 40 % hodiaŭ)*



*studentoj por sendependiĝo, emeritoj laŭ sia plaĉo, virinoj (nur 40 % hodiaŭ laboras), senlaboruloj.*
*- parto de nia labordaŭro estas nur ĉeesto en la laborejo.*


*Se oni kalkulas labordaŭron kun tiu faktoraro, oni povas montri, ke kvarono de la nuna laboro sufiĉus por kontentigi la bezonojn de la popolo, eble eĉ malpli, se ni konsentus malpli grandan konsumadon. Ĉu hodiaŭ ni pli feliĉas produkti kvaroble pli ol en 1950 ? Ne, se tiu produkto estas ne konsumebla, kiel armiloj, aŭ ne utilas kiel administraj komplikaĵoj, aŭ malŝparigas kiel veturilaj akcidentoj, kiel medikamentoj. Ĉu ni ne preferus labori kvaroble malpli, konsumante kiel*



niaj gepatroj en 1950. Eble jes, eble ne ! ĉiel vi ne rajtas elekti. Kapitalismo devigas vin labori. Vi rajtas elekti nur inter plenplena laboro kaj libereco kun mizera enspezo, eĉ multaj senlaboruloj ne elektis siajn kondiĉojn. La labordaŭro estas difinita per leĝo. Ni ne estas sufiĉe maturaj por decidi niajn proprajn bezonojn ! Ni rigardu la redukton de la laborsemajno antaŭ 1935 :

Eŭropo
- 65 horoj en 1850
- 60 .......... 1900
- 50 .......... 1920
- 43 .......... 1935

Usono - 36 .......... 1935




Feliĉe milito haltigis tiun frenezan sinkon, mortigante senlaborulojn kaj detruante produktojn por artefari novajn bezonojn.

Tiu evoluo kadukigas la unuvoĉan sloganon pri labor-rajto. La laboro ne estas rajto sed nur devo partopreni la kolektivan produktadon. Sed fakte nur la laboro por la vivtenaj bezonoj (manĝado, loĝado, sano...) devus esti kolektive difinita. Estas la homrajtaj bezonoj.

Nun ni havas du vojojn :

- Aŭ ni estas ĉiam pasivaj kaj ni atendas venontan mondmiliton (verŝajne la lastan), ĉar senlima kreskado ne povas ekzisti sur limigita loko kun limigitaj energioj kaj krudaj materialoj. En rasista kaj neegaleca etoso tiu milito des pli profiliĝas, ke ni malŝparas tempon por konstrui pli kaj pli danĝerajn armilojn.
- Aŭ ni postulas organizon, kiun ni devas tuj pripensi, socian organizon kun vera libereco dank'al esprimrajto kaj redukto de labortempo, kun vera egaleco dank'al dispartigo de riĉaĵoj inter ĉiuj homoj kaj la diversaj landoj, kun vera frateco dank'al amikeca kaj komunikema socio.

**Sed praktike kion fari ?**

- Unue sin mem liberigi ;
- due informi aliajn ;
- trie pripensi la revolucion.

Kiam oni konscias pri sia celo, oni pli trafe agadas, profitas de sia kompreno por forĵeti siajn ĉenojn, por rifuzi la socion de havo, vojirante la estan vivon. Fakte, la nuna organizo posedas neniun homan estontecon.

Precipe la infanojn ni devas informi. Kial la infanoj hodiaŭ trapasas lernejon ? por lerni profesion, sed nur 40 % el la homoj laboras. Tiu laboro daŭras jare dum 1750 horoj. Tio signifas, ke la labortempo okupas nin dum $\left(\frac{1750 \times 40}{365 \times 24}\right) \rightarrow$ 8% de nia vivtempo.

La hodiaŭaj lernantoj ne laboros post sia studado pli ol 5% (eble malpli) el sia vivtempo (se oni konsideras la studan kaj emeritan vivon).

Se oni konsideras la fiziologian tempon (manĝi, trinki, dormi : 12 horoj tage), la libertempoj kaj la ferioj estos kvinoble pli longaj ol la laboro. Ĉu profesio estas tiel grava ? Ĉu amuziĝo, amikeco, feriado, vojaĝo, studado ne estas lernindaj ? Hodiaŭ, la junaj emeritoj suferas pro manko de pretiĝo. Kiam ili havas interesan okupon ekster la profesio, ili povas profiti la liberan tempon. Sed se ili havis nur pasivajn libertempojn, la ĉesigon de la laboro ili eksentas kiel morton. Se ni mem ne sukcesis organizi nian feliĉon, ni klopodu almenaŭ por niaj infanoj, ke ili ne bedaŭru sian naskiĝon.


**Mona problemo**

Homo, kiu aĉetis dolarojn antaŭ tri jarojn, por ilin vendi hodiaŭ, duobligis la valoron de sia mono. Li pliriĉiĝis nur ŝanĝante nacian valuton en oportuna momento. Sed por fabriki la varojn, kiujn li aĉetas per tiu profito, usonaj aŭ alilandaj laboristoj pro tio servutis. Tiuj borsaj spezoj estas leĝigita paraziteco. Por eviti tiel grandan diferencon inter la diversaj landoj, la prezo de iu varo difiniĝu

- ĉefe per la labordaŭro necesa por ties fabrikado,
- per la kvanto da energio kaj krudaj materialoj uzitaj,
- per ties utileco.

Kial ni ne difinu la prezojn nur laŭ la plenkosto? Ekzemple : la transportoj. Pro la utileco de la busoj kaj trajnoj, la ŝtato subvencias la komunajn transportojn, tiel ke la uzantoj ne pagas la plenkoston sed nur parton. Pro la taksoprezo, aŭtomobilo, por unu persono, kostas duoble pli ol trajno aŭ buso. Tiuj taksoj utilas por konstrui aŭtovojojn, stratojn, parkejojn... sed sociaj kostoj kiel akcidentoj (200 000 mortintoj kaj pluraj milionoj da vunditoj ĉiujare), kiel poluado aŭ bruo, kiel perdita tempo pro trafikŝtopado, multe pli gravas en la individuaj transportoj, ol en la kolektivaj. Italaj kaj francaj eksperimentoj pruvis, ke 15 procentojn de la aŭtomobila trafiko allogas senpagaj komuntranspor-

toj. Kiel financi senpagajn transportojn ? Fakte tiu 15-procenta transmeto ebligas ŝpari unue la kasdiferencon inter individua kaj komuna transportoj, due la socian koston. Studo pri la francaj transportoj demonstras, ke ŝparo valoras pli ol 2 % de la nacia produkto, tio estas trioblo de la "kosto de la senpageco" (mono hodiaŭ pagata de la vojaĝantoj). Tiu plibonigo ĉiujare gajnigus ankaŭ miliardojn da horoj hodiaŭ perditaj pro trafikŝtopado, ŝparigus 30 000 mortintojn kaj duonmilionon da vunditoj aŭ handikapuloj. Pli bone






ni spirus en la urboj... Sed kial do la komunaj transportoj ne estas senpagaj ? ankaŭ pro ekonomia kaŭzo:

Ŝparo = malpli granda konsumo = senlaboreco
malŝparo = kreskado = dungado

Ĉu vi komprenas la situacion ? Sama problemo pri loĝado. Kiam ekzistas sufiĉe da loĝejoj por ĉiuj, iuj ne estas okupitaj, ĉar tro multekostaj aŭ detruotaj (por konstrui pli novajn kaj pli rompiĝemajn), dum iuj familioj mizere vivas en domaĉoj. Ekzemple, Parizo, kie mi loĝas, nombras 90 000 mendojn, dum 165 000 loĝejoj (13 % el la tuto) estas malplenaj. La leĝo pri oferto kaj mendo ne plu regas prezojn, ĉar kiam oferto superas mendon, la apartamentoj devus malpli kosti ĝis ekvilibro, sed tiu ekvilibro mortigus kapitalistan profiton, kiu artefaras prezon. Entenas tiun prezon la notariaj enspezoj (10% por pagi kelkajn laborhorojn kaj subskribon). Se oni pagus nur la plenkoston de la konstruo, la monata luprezo ne devus pli kosti ol tritaga salajro. Tro ofte la prezo estas triobla, eĉ kvarobla.

Sama problemo pri Esperanto : laŭ la studo de Dro HASZPRA Otto, konferenco de la Esperanto-Asocio en Kulturligo (GDR), lingvolernado kaj tradukado kostas pli ol 10 miliardojn da dolaroj, sed la tempoperdo pro lingva lernado estas ĉ. 2000 horoj, t.e. unu semajno da libertempo ĉiujare dum 40 jaroj. Kompreneble, se Esperanto estus uzata de ĉiuj, ni ne plu bezonus plurlingvismon, tradukistojn, magnetofonojn, kiuj ebligas artefaritan miskomunikadon, multekostan. Ju pli multekostaj la tradukaj elspezoj, des pli sana la kreskado, des pli da homa laborigo. Ekzemple Tutmonda Organizo pri Sano malŝparas 50 % el sia buĝeto pro lingvaj problemoj.

En ĉiuj fakoj (nutrado, loĝado, energio, sano, komunikado, transportoj...) ekzistas malŝparoj vivigantaj kreskadon, ununuran motoron de kapitalismo.

(daŭrigota)

La fino de tiu ĉi studo aperos en venonta L!

La interesatoj, kiuj ŝatus rilati kun la aŭtoroj, cele al interŝanĝado de ideoj kaj kunagado, bonvolu noti jenan adreson :

T G V (Transport Gratuit des Voyageurs)
33, rue des Vignoles, F 75020 PARIS

## KIO RESTAS AL NI

Amikoj el mia knabeco
pasas en sonĝo;
ni remas petole sur lago
sen cerbumo pri l' estonto.
Alternas oro kaj verdo,
freŝiga l' aero, kaj fiŝoj
zigzagas en perlaj akvoj,
sed jam grakas kornikoj

*

Kara, ŝi duonvoĉas, ankoraŭ ne
sin montras la demonoj;
ni serĉu saĝon rezistan
ĉe tiuj kiuj sen futuro
ĉiam devis barakti por
sia vivo sieĝata

*

La monstroj serpentas tra la nokto,
buŝoleke, nudadente...
Paliĝas la steloj

*

Karaj de l' juneco,
solaj en via agonio,
viaj flustroj ade nin ĉirkaŭas

*

Ni vadas plu-plue
tra l' faŭka kaoso;
nudas ni, sen gaja mesaĝo.
Svarmas vulkanoj meze de
marĉoj venenaj, kaj planita
eksplod-ekstermo minacas
mutigi nian buŝon

*

Se ĉi drakoj triumfos
ne plu ridos infanoj,
ne plu zigzagos fiŝoj,
ne plu verdos herbejoj...

*

Agadi, hezite fidi, obstine
klopodi treni nin mem
ĉe la haroj el la marĉo;
espero sen iluzio,
espero malgraŭ despero

jen, kio restas al ni ...

(novembro 1983)

Feiko Munniksma

---

## NASRUDIN

*"Mi pendigos vin", diris kruela reĝo, aŭdinte pri la fortoj de Nasrudin, "se vi ne pruvos, ke vi estas mistikulo."*
*"Mi vidas strangaĵojn", Nasrudin tuj diris, "oran birdon en la ĉielo, demonojn sub la tero."*
*"Kiel vi povas travidi la solidan, penetri la ĉielon?"*
*"Necesas nur timi."*

*

*"Jes, majstro, vi perdis azenon - sed kial lamenti pli ol pri l' unua edzino?"*
*"Memoru, ke kiam mi perdis la edzinon, ĉiuj vilaĝanoj diris : "Ni trovos alian". Ĝis nun vi ne proponis alian azenon."*





# ĉies voĉo pri ĉio ajn

**_Reagoj de franca porpaca aktivantino pri la pola televido_**

*Mi estis en Pollando en novembro, kaj ĉiutage mi rigardis la informbultenon de la pola televido.*

*Ĉiuvespere estis bildoj de okcidentanoj, kiuj manifestacias kontraŭ "la usona imperiismo". Neniam estis dirite, ke ili manifestacias kontraŭ ĉiuj atombomboj, por la paco en Eŭropo, ktp. Ne! Ĉiam la sama propagando: vidu kiel la kompatindaj popoloj de Okcidenta Eŭropo kuraĝe luktas kontraŭ la usona imperiismo.*

*Kelkfoje tiu propagando efikas. Tamen, en Pollando, ĝi povas havi efikon malan de tiu celita de sinjoro Jaruzelski kaj liaj amikoj : poloj kutimas aŭskulti "Voice of America" aŭ "Radio Free Europe" en la pola lingvo. La usonan radion ili aŭskultas tiom fervore, kiom dum la nazia okupado francoj aŭskultis la franclingvajn elsendojn de BBC. Usono aspektas kiel la lando de la libereco, kaj la pacistoj aspektas kiel homoj, kiuj favoras la sovetian imperiismon. La dua mondmilito ankoraŭ ne estas finita : iam Germanio kaj Sovetio interkonsentis malprofite al la pola popolo (kaj al la baltaj popoletoj), Germanioestis venkita en 1945 sed Sovetio venkis. Estas devo de ĉiu polo daŭrigi la lukton per ĉiaj rimedoj. Al mia demando : "Ĉu vi kun gaja koro konsentus, ke usona bombo detruu Varsovion?", polo, kiu estis mallibera dum la militstato, respondis : "Mi preferas, ke Usono detruu Varsovion kaj Moskvon, ol ke Sovetio detruu Varsovion kaj Parizon."*

*Kiel ĉiuj francaj pacbatalantoj, mi kutimas la riproĉon pri la ligeco de pacistoj kun Sovetio. Sed ŝokis min, ke tiujn riproĉojn mi aŭdis de homoj, kiuj tute ne estas dekstraj, kaj kiuj kuraĝe luktas por la libereco de sia popolo. Mi opinias, ke ni devas serioze konsideri la problemon de la misuzo de la pacmovado, en oriento*

*fare de la amaskomunikiloj de la komunismaj reĝimoj, en okcidento fare de la okcidentaj komunismaj partioj (ĉefe la franca) :*

*Ni devas zorgi, ke niaj manifestacioj ne aspektu kiel unuflankaj : se ni protestas ĉe la ambasado de Usono, aŭ en Okcidenta Germanio tie, kie oni planas meti atomarmilojn, ni ĉiam havu banderolon kontraŭ la aliaj atomarmiloj (inkluzive de la sovetaj kaj ĉinaj). Se ni protestas, ke eklezio benas kanonojn (la franca katolika episkoparo ĵus aprobis la nukleajn armilojn), ni informu ankaŭ pri la kanonoj de la ateismaj ŝtatoj. Dum manifestacioj, ni surhavu, tre videble, la insignon de "Solidarnoŝĉ". Se ni partoprenas en porpaca manifestacio organizita de la komunista partio, ni venu kun flugfolioj kontraŭ SS 20, petu parolrajton por solidareca deklaro kun la popolo de Afganio, ktp.*

*Eble ni povus eĉ organizi specialan manifestacion: ekzemple, centoj da homoj sendu al sovetia konsulejo demandarojn por vizoj menciante, ke ili volas iri al la Ruĝa Placo en Moskvo (rusa soveta respubliko) kun la celo manifestacii kontraŭ SS 20. Kompreneble, necesus ĵurnalistoj kaj fotistoj. Iliajn reporteraĵojn certe ne vidus la telespektantoj de Pollando, sed la GDR-anoj rigardas la okcidentan televidon, kaj oni povas ricevi informojn per leteroj (eblas legi "Le Monde" en speciala loko, nur se oni scipovas la francan, kompreneble, sed sen kontrolo).*

*Ĉar estas en la legantaro de "Laŭte!" sufiĉe multaj pacaktivantoj, mi ŝatus legi iliajn reagojn, sugestojn, ktp.*

*Jakelino.*

---

### *Pri la cirklokvadraturo*


*Ĉar la cirklokvadraturo perpleksigas leganton, jen "Kvadratigo de cirklo", solvo de SPECHT, 1836 :*
*Cirklo de centro C, diametro OI.*
*Sur tangento en O :*
*OA = 1,1 * OI ; OB = 1,3 * OI ; OD = -,25 * OI.*
*Rektu AC, sur OI havu OH = AC. Rektu HG // BC.*
*DG = pi. Estu DG diametro de cirklo kaj K punkto de ĝi kaj OI.*
*OK estas bazo de kvadrato egala al cirklo C.*

*P.M.G.*



***Laikeco kaj raketoj*** *: Multe oni parolas pri laikeco, egale pri raketoj en Francio, sed francoj certe ne konas la marĉandadon faritan ĉirkaŭ tiuj du vortoj, jezuitan marĉandadon... Niaj francaj episkopoj subite, ne de longe, estas por la ekvilibro de la potencoj, sed sammomente komencas dialogon pri la laika problemo. Strange!!! Vi vidos, ke konsento estos realigita pli rapide ol baloto pri leĝpropono pri Esp. Estu atentaj!!!*

*J.Royer*




*Kvadratigo de cirklo, Specht, 1836.*

## *BABEL*

*Rilate al "ĉiela najbaro", la pastraro iam decidis la konstruadon de gigante alta turego - ĝis la loĝejo de Dio - la turego "BABEL", por havi senpenan kontakton kun Dio mem, por ke Li sendu **kiam necese** sunon aŭ pluvon, kiam agrikulturo ĝin bezonas, por ke la pluvo ne dronigu tutan bestaron en stalo kaj ne forportu homajn kaj bestajn manĝaĵojn kolektitajn kun tiom da penoj kaj klopodoj, por ke Li intervenu en problemoj de sano, fiŝkaptado ktp.*

*Por la konstruado de BABEL oni bezonis nekredeble grandan nombron da homoj, por havigi kaj transporti materialojn, por loĝigi kaj nutri sklavojn kaj laborbestojn, kiujn oni alportis de tre malproksimaj regionoj, pri kiuj la biblio ne aludas...*

*Kiam la diversaj popoloj de tre malproksimaj regionoj nomis per tre diversaj vortoj la saman objekton, laŭ sia kutima uzado, la pastraro anoncis, ke Dio, la najbaro en la ĉielo, devis krei la **poliglotismon** por malebligi la konstruadon de tiu turo BABEL, kiu devis ebligi eniron en la loĝejon de Dio.*

*De post relative freŝdataj eldonoj de la biblio (la 13a jarcento), vortoj aŭ frazoj estas presitaj en kursivo kaj aldonitaj por komprenigi tekston al la "ne-avertita" leganto. Tio estas procedo akceptebla, sed ankaŭ ebleco por la tradukisto aldoni sian fantazion por enkonduki mirindaĵojn. "traduttore - tradittore".*

*-nn-*

---

### Internacia Ferio-Semajno de TANEF 1984

De la 19a ĝis la 26a de majo TANEF organizas internacian feriosemajnon en la Naturamika domo "Pension Gnaid" en la klimata kuracloko Dorf Tirol, supre de Merano, Italio.

Favorita per la situo kaj kuŝanta en la Merana kaldronvalo kun sia milda, suna klimato, Dorf Tirol tre taŭgas por printempa feriado. Dorf Tirol prezentas al la gasto multspecan flaŭron, kiu ampleksas mediteraneajn kaj ankaŭ altalpajn plantojn. Parto de la komunuma regiono atingas la naturparkon "Texel-gruppe", kiun fondis la sudtirola federacia registaro en 1976. Temas pri regiono riĉa je naturbelaĵoj kaj grandparte ne tuŝita kampo.

Prioritaton havas, okaze de nia feriosemajno, la seminario "Sekurigi la pluvivadon".

Projektitaj posttagmezaj okazontaĵoj : Vizito al la mondfama kuracloko



Merano - Migrado : Hochmut (telfero), Vellaŭ-a roka vojo, Vellaŭ, Vellaŭ-a vojeto, Dorf Tirol - Vizito al la kasteloj en la proksimeco de nia feria loko - duontaga ekskurso al "Vinschgau", kie ni vizitos Laas, kiu posedas la plej grandan trovejon de blanka marmoro en Eŭropo. La tuttaga ekskurso kondukos al la Dolomitoj.

Kostoj por Naturamikaj membroj : 380 S.Fr, por nemembroj 430 S.Fr. Post la 31a de marto la prezoj altiĝos je 10 %.

Informoj kaj aliĝo al : TANEF, poŝtfako 225, CH-4003 Basel, Svislando.

### La E-MOVADO en ĜIRONO (Katalunio)

La 21an de oktobro okazis en Ĝirono manifestacio por la paco kaj malarmado, al kiu aniĝis la geesperantistoj de Ĝirona Espero.

La 23an de oktobro okazis ĝemeligo inter la E-grupo Ĝirona Espero kaj la E-grupo el Perpignan.

Dum la jara foiro, de la fino de oktobro ĝis la 6a de novembro, kiel kutime la E-budo estis aranĝita kun E-afiŝoj, turistaj revuoj, sub la devizo "Esperanto, lingvo por la Paco". Funkciis ankaŭ libroservo kaj oni disdonis broŝuron en kataluna lingvo pri Esp-o dank'al la urbestraro.

### ESPERANTO en NIKARAGVO

Sekve de diversaj iniciatoj, la broŝurservo de "Laŭte!" estis komisiita sendi en 1983 al Nikaragvo pakojn el "Esp. en 24 paĝoj". Ĵus atingis nin, kune kun la unua numero de "Nova Sento", la informbulteno de Nikaragva E-Ligo, letero de unu el la tieaj respondeculoj :

"Ni ĉiuj estas komencantoj, sed ni volonte deziras disvastigi la movadon de Esperanto en nia lando. Ni bezonas vian helpon, ni bezonas la broŝuron "Esp. en 24 paginas" laŭ via konsidero. Sed se vi havas altnivelan materialon, ĝin ni ankaŭ ricevos kun granda ĝojo. Saluton de via amiko, José D. Gaitán M "

Vi povas ankaŭ skribi al la komencantoj :

Patricia Vidaurre (modistino), Academia "SINGER", Apartado 2826, Managua
F-ino Ziomara Solari, Casa Nº G-530, Colonia 14 de Septiembre, Managua
D-ro Luis Medina Bravo (kuracisto), Clínica Santa María, Calle 14 de Septiembre, Managua
Gloria Miranda, Oficinas de CARIBE MOTOR Kms.4 Sur., Managua.
Yadled Morales Jeréz, Colonia 14 de Septiembre, 4-30, Managua.

---

**Solvo de la krucvorta enigmo de L! 51 :**

Horizontale : 1. SKORZONERO. 2. INDIENA. EK. 3. NE. PFENIGA. 4. ODORI. ONOZ. 5. FURORI. FLA. 6. EJAĈ. ESEON. 7. ROTET. ER. 8. ONIKSETA. 9. JARDEKONOJ.

Vertikale : 1. SINOFEROJ. 2. KNEDUJO. 3. OD. ORATOR. 4. RIPROĈEND. 5. ZEFIR. TIE. 6. ONE. IE. KK. 7. NANO. SESO. 8. INFEREN. 9. REGOLO. TO 10. OKAZANTAJ.

## *57a S.A.T.-KONGRESO en BORDEAUX.*
## *1.8 ĝis 8.8. 1984*

OKK-sekretario: ROBERT Léo, 11 rue des frères Lumière, F 33150 CENON

La **Kongresejo** estos la "Maison de la Promotion Sociale" (Domo por Socia Promocio) staranta ekster la urbego en duonkampareca loko sur la komunumo Artigues. Urbaj busoj interkomunikigas ĝin kaj Bordozon. Ĉiuj kunsidoj, ĉiuj manĝoj okazos surloke, ankaŭ dormado por 130 kongresanoj; la ceteraj loĝos en proksimaj hoteloj, aŭ tendumos.

**Okaze de la kongreso**, la ĉeestantoj povos partopreni, laŭ antaŭa elekto :

- en unu duontaga ekskurso aŭ al SAINT-EMILION, kurioza malnova urbeto ĉirkaŭita de famkonataj montetaj vitejoj ; aŭ al BLAYE kaj ĝia XVII-jarcenta citadelo ĉe la elfluejo Ĝirondo ; aŭ al LA BREDE, kastelo kie vivis la aŭtoro de "L"Esprit des Lois" (La Spirito de la Leĝoj).

Vingustumado estas antaŭvidita en ĉiu el la tri ekskursoj.

- kaj en unu tuttaga ekskurso : aŭ tra la tutmonde famkonata vinregiono MEDOC kun vizito al vinkelo kaj muzeo en kastelo Mouton-Rotschild kaj al la kooperativa vinfarejo en Pauillac, urbeto ĉe Ĝirondo ; aŭ per ekskursŝipo sur Garono, laŭ la tajdotempo ĉu alvale ĝis Blaye, ĉu almonte ĝis Cadillac ; aŭ al ARCACHON : per ŝipo tra la Arkaŝon-golfeto, kaj grimpado (laciga) al supro de la dunego en LE PILA ĉe oceano ; aŭ tra la vasta pinarbaro ĝis MARQUEZE, ekologia rezervejo kaj plenaera muzeo.

La **Antaŭkongreso** okazos en urbo PAU de 25.7 ĝis 1.8. 1984.
Pau kuŝas proksime de la montaro Pireneoj kaj de Atlantika Oceano;
La ĉeestantoj ekskursos :

- al SAINT-JEAN-DE-LUZ tra ravaj valoj de la Vaska regiono ĝis la oceano; al ARTUST-lago, 2000 metrojn alta en Pireneoj per telfero; al BETARAM-grotoj duondistance inter Pau kaj la pilgrima urbo Lourdes (Lurd') ; al LACQ : vizito al gas-ekstraktejo


kaj ili vizitos la urbon PAU (kastelo, panoramo al Pireneoj...)

Detalaj informoj pri kongreso, antaŭkongreso, aliĝilo, aperos en la januara n-ro de "Sennaciulo", organo de SAT. Eblas ilin ricevi, ankaŭ skribante al la OKK-sekretario, aŭ sin turnante al la SAT-sidejo : SAT, 67 av. Gambetta, F 75020 PARIS.


## INTERNACIA JUNULARA RENKONTIĜO
## **Villandraut, Ĝirondio 27/31 Julio 84**

Informojn kaj aliĝilon bonvolu trovi ĉi-poste !





# Villandraut : 27/31 Julio 84




Tiu ĉarma urbeto situas 40 km de Bordeaux en la sud-okcidenta Francio. La ĉirkaŭa regiono "GASKONIO" havas originalan kulturon kaj variajn pejzaĝojn.
<u>Venu ĉi-tien por malkovri ĝin kaj renkonti geesperantistojn !</u>

Ni loĝos en agrabla mezlernejo (4 gastĉambroj) kun vasta apuda herbejo por tendumi. Pri la manĝado, zorgos la vendejo pri biologiaj nutraĵoj "Docteur Knock". Eblos naĝi ĉiutage en la urba naĝejo tute proksima.

Ĝis baldaŭ ! Amike !



La terura O. K.

* *

## 4 tagoj kun animata programo!

DEBATOJ

TEMOJ JAM FIKSITAJ (Kromaj temproponoj kore bonvenaj)

- <u>PACISMO</u>, ĈU BALDAŬ MONDMILITO ?
- <u>ETNAJ PROBLEMOJ</u> AKTUALAJ
- <u>ESPERANTO</u> : KIEL PROPAGAND-AGADI NUNTEMPE ?

.. ..

FESTOJ !

- VESPER-ANIMADO KUN ESPERANTISTAJ KANTISTOJ.
- INICO AL LA GASKONAJ DANCOJ !
- FOLKLORMUZIK-FESTO, POSTE BALO !
- JAZ-Animado (verŝajne).

.. ..

AVENTUROJ EN LA KAMPARO !

- Longa malsuprenirado de rivereto per kanuo.
- Tri perbiciklaj ekskursoj (ebla luado surloke).
- Granda ekskurso al tipa vilaĝo izolita en la arbaro, "MARQUEZE".
- Perpieda promenado tra pitoreska "CIRON" valo.

.. ..


ALIAJ DISTRAĴOJ

- Vizitado de la apuda mezepoka kastelo kaj inico al la arkeologia serĉado.
- Projekcio de esperantlingvaj filmoj.
- Lumbild-prezentado pri nia regiono.

Ktp...


.. ..





POR TRANOKTI, <u>NEPRE</u> KUNPORTU DORMSAKON.

POR BICIKLADI, KUNPORTU BICIKLON SE EBLAS.



EKZAKTA PROGRAMO EN VENONTA INFORMILO !

# INTERNACIA JUNULARA RENKONTIĜO

## VILLANDRAUT 27/31 JULIO 1984

## ALIĜILO (Bonvolu skribi preslitere)

ALIĜKOTIZO : 50 FF (je la nomo de la kasisto Gilles LAFITTE, bankk "Société Générale", 00050275826 Bordeaux-Chartrons)

*Familia nomo :........................................................*

*Antaùnomo :...........................................................*

*Naskiĝdato :.........................................................*

*Adreso :................................................................*

*Lando :..................................................................*

*Ĉu vi estas komencanto en E^o ? : JES / NE*

*Kiamaniere vi intencas vojaĝi ? : AUTOMOBILE / TRAJNE / VETURPETE / ........................................*

*Mi deziras lui biciklon : JES / NE*

*Mi partoprenos en la ekskurso per kanuo : JES / NE*

*Kiamaniere vi intencas tranokti ? : TENDUME (senpage)/ EN KLASĈAMBRO (page) ; NEPRE kunportu dormsakon !*

$ $ $ $ $ $ $ $

> ATENTU ! Ni fiksos la gastkostojn laù la provizora nombro da partoprenantoj. Kiu havas la intencon veni, tiu anoncu sin frue sendante aliĝilon kaj aliĝkotizon al : Jean Luc BERARD
> 10 rue Maryse Bastié
> (sekretario) Bât. C5, N° 18
> 33300 BORDEAUX

LA KOSTOJ ESTOS INDIKITAJ SUR LA DUA INFORMILO

# LAŬTAJ PETOJ KAJ INFORMOJ

******************

## SAT 22 - VIDESP

Dum la lasta SAT-Amikara kongreso en Saint-Brieuc, vi spektis videajn programojn en Esperanto. Car pluraj gekamaradoj petis al ni, ke ni pruntedonu al ili la kasedon, tial SAT 22 decidis krei aùdovidan sekcion, kies nomo estas VIDESP. Ni intencas produkti unu trihoran videan kasedon ĉiujare, kaj krome, diversajn aùdovidajn dokumentojn (sonbendojn ktp).

La kasedo, kiun vi spektis en la kongreso, estas nun disponebla, laù jenaj kondiĉoj* :

- luprezo : 70 FF, inkluzive la sendokoston (registrite); la resendo de la kasedo okazos viapage).
- garantisumo : 300 FF. Vi sendu al ni apartan ĉekon por tio, kaj ni resendos ĝin al vi, ricevinte la kasedon bonorde.
- la luprezo donas al vi la rajton konservi kaj uzi la kasedon 2 semajnojn; ekzemple : ni sendu la kasedon la 1-an de marto, vi resendu ĝin la 14an.
- ĉiu kroma semajno kostas 50 FF. Vi precizigu kiom longe vi intencas konservi ĝin, mendante la kasedon.
- Ni konsilas al vi proponi almenaù 2 diversajn periodojn, por ke ni povu sendi ĝin al ĉiuj.
- VIDESP konservos al si la garantisumon en okazo de perdo de la kasedo (dum la sendo aù la resendo) kaj en okazo de difektigo.

TEKNIKAJ DETALOJ : temas pri V.H.S.-kasedo, legebla nur per V.H.S.-aparatoj. Se vi deziras BETAMAX aù V2000-kasedon, ni verŝajne povos liveri tion al vi, laù jenaj prezoj : luprezo : 150 FF, kroma semajno : 100 FF, garantisumo : 500 FF (ni estos devigitaj lui aparatojn por Beta- aù V2000-igi ĝin). Sed ni ne povas firme promesi tion.

Krome, la kasedo estas kolora, nur kondiĉe ke la magnetoskopo kaj la televidilo estu SECAM-aparatoj (franca sistemo). Per PAL-aparatoj vi spektos ĝin nur nigre-blanke, kaj per NTSC ĝi estas nelegebla.

Se vi deziras pluajn informojn (enhavo de la kasedo...) skribu al: VIDESP, ĉe Jacques PAUL, 19 lotissement du Minerai, F 22210 PLEMET

---------

* tiuj prezoj validas nur por Francio. Por aliaj eùropaj landoj, aldonu 20%, ekster-eùropaj landoj, aldonu 30 %.

Poŝtkonto : SAT 22 Amikaro, 2366 13 K, Rennes.

## PRELEGO PRI ZAMENHOF

Kiam profesoro Rabinowitch, kreinto de la Universitato en Perpignan petis prelegon al S-ro Llech Walter, nia samideano elektis kiel temon "D-ro Zamenhof, bonfaranto de la homaro". La prelego okazos la 15an de februaro 1984 en la Palaco de la Kongresoj de Perpignan. La Akademia Inspektoro prezidos la prelegon.

## *Pri "Hanna K", la lasta filmo de Costa Gavras :*

Estas pluraj diversaj vidpunktoj pri tiu filmo. Unua bildo : antaŭ araba domo, patrino lulas sian infanon en siaj brakoj. Belega bildo, kvieta, plena de tenereco. Poste aperas izraelaj soldatoj, arestantaj Selim, kaŝitan en puto. Kiu estas Selim ? Kio okazis pri lia vivo antaŭ lia aresto ? Kio estas la rilatoj inter la malliberuloj kaj liberuloj en Palestino ? Ne estas klarigoj pri tio. Bedaŭrinde, Selim estas nur dosiero por juĝo. Costa Gavras kutimigis sian publikon al politika kino kiel "Z", "Etat de Siège", "L'Aveu", "Missing".

Li prisilentis la teruregan vivon de la Palestinanoj en la okupataj teritorioj, la vivkondiĉojn en la malliberejoj ktp... Ĉu li timis la cenzuron ? Ni ne forgesu la cionistan influon super la ekonomiaj strukturoj en Francio kaj super la diversaj amaskomunikiloj. Tamen Costa Gavras montras al ni, kiel tragedia estas la konflikto inter Palestinanoj kaj Izraelanoj.

Ĉe la palestina flanko : iomete, la vivkondiĉoj de la popolo serĉanta hejmon, en la "kolonioj", kie devige ĝi devas restadi kvazaŭ en gettoj. Ĉe la izraela flanko : la popolo serĉanta identecon. Kelkaj fuĝas la okcidentan antisemitismon, la cionistan ŝtaton en Izraelio, la izraelan socian komplikecon, kaj konscias pri la senmaskiĝo de la izraela demokratio.

La lasta film-bildo impresis min. Dum la izraelaj soldatoj estas arestontaj la fuĝintan Selim, Hanna K (la advokatino kiu defendis Selim), sola, post forpelo de Joshuo, la patro de ŝia infano, eksedziniĝonta al Viktor (franca judo) sin demandas pri sia identeco.

Malgraŭ tiuj mankoj, tiu humana filmo estas vidinda. Bedaŭrinde, ĝi tro rapide malaperis el la bordozaj ekranoj.

***

Franca medicina taĉmento alvenis la 24an de oktobro en Tripoli. Baldaŭ sekvos alia kirurga taĉmento. Necesas financa helpo kaj sendo de kuraciloj.

Palestina agendo aperis. Kosto : 25 FF (kun afranko, 30 FF). Disko: "Chant pour les oliviers" (Mohamed Bhar, tuniza kantisto) : 50FF (kun afranko, 65 FF). Mendi al : A.M.F.P. (franca-palestina medicina asocio), 14 rue de Nanteuil, F 75015 Paris.

Ginette G.

## *Nia kriminala felietono (nova serio)*

Pierre MARTIAL CARDONA, ĵurnalisto kaj animanto de la eldono "Avis de recherche", estis ĵus informata de la tribunalo de Liono, ke, kvankam li aĝas 30 jarojn, li estas serĉata pro sia rifuzo soldatservi. Pierre MARTIAL estas koncernata de arestordono kaj riskas, ekde sia arestiĝo, unu jaron da mallibero.

Ĉar en februaro 1974 li ne respondis, pro motivoj ĉefe liberecanaj, la alvokon iri al kazerno, Pierre MARTIAL, kiu tiam aĝis 20 jarojn, estis koncernata de serĉado fare de la franca polico, kaj poste de internacia arestordono. Por eviti malliberon, li kaŝis sin dum 7 jaroj. Kiel ĉiuj soldatserv-rifuzantoj, li estis amnestiata en majo 1981, kaj li montris sin dum gazetkonferenco organizita en Parizo la 30an de junio '81 de gazeto "Avis de recherche", kies redaktoro li estis. Kun surprizego kaj kolero li ekscias nun, ke, kvankam li aĝas 30 jarojn, li ankoraŭ ne estas libera je la devo soldatservi kaj ke, per justica ruzo, oni serĉas lin pro delikto jam 10-jara.

Denuncante la absurdecon de tiu justica proceduro, advokato Denis Langlois, kunzorganto pri juro de la eldono, kaj la redaktora skipo de "Avis de recherche" alvokas ĉiujn, kiuj sentas sin solidaraj, urĝe aliĝi al la kampanjo por fronti la areston de Pierre MARTIAL kaj tuj ĉesigi la persekuton kontraŭ li.

Plua informo, petskribo, financa helpo ĉe :

Avis de recherche, B.P. 53, F 75861 PARIS Cedex 18.

Informas Jakelino.

***************************************************

## LA 39-a KONGRESO DE SAT-AMIKARO okazos en DRAGUIGNAN (21/24.Aprilo 1984)

Urbo Draguignan, kiu entenas 28 000 loĝantojn, situas tute proksime de la Lazura Marbordo kaj proksime de monto. Ornamita per floroj, urbo Draguignan, kiun nenia industrio malpurigas, ĉarmos vin per siaj malnovaj kvartaloj, siaj multkoloraj vendejoj. Cetere, "Provenco" estas magia vorto, kiu elvokas la sunon, la lumon, la muzikoplenan voĉtonon, la parfumojn de aromaĵoj, la olivejojn kaj la lavendejojn.

Dum la 2 ekskursoj, la Kongresanoj plezuriĝos per la beleco, eĉ la sorĉo de nia regiono.

Dum la duontaga ekskurso, vi vizitos pitoreskajn malnovajn vilaĝetojn, kiuj elspiras bonodorajn timianon, majoranon kaj rosmarenon.

Dum la tuttaga ekskurso, vi malkovros la mirindajn imponajn fame konatajn interkrutejojn de rivero Verdon.

Ni konsilas al vi legi aŭ relegi librojn de **Jean Giono, Marie Mauron, Paul Arène, Frédéric Mistral, Marcel Pagnol**, por pli bone kompreni nian mirindan Provencon.

Petu kongresaliĝilon al K-ino Michèle Freud, 120 av. Calmette, 83300 Draguignan.

La kongresmarkoj estas mendeblaj ĉe k-ino Freud :

- 20 markoj kostas 5 FF
- 12 markoj kostas 3 FF.

La O.K.K.

## Ĉu Zamenhof parolis okcitane ?

36 geesperantistoj renkontiĝis en "Piquepoul", okcitana lernejo proksime de Villeneuve sur Lot, okaze de nia akvitania Zamenhof-tago. Alveturis trajne kaj aŭte geamikoj el departementoj 19, 24, 32, 33, 46, 47, 81 kaj 82. Varme bonvenigis nin nia okcitana amiko Marceu Esquieu. Post la tagmanĝo, simpla sed bongusta, okcitana trupo prezentis al ni kaj al pluraj dekoj da okcitana publiko la teatraĵeton de M. Esquieu "La Patacada". Post unu horo kaj duono da ridegado okazis la tradicia supo (elp. "turî"), kiun por multaj akompanis la same tradicia "ŝabrot"". Vere neordinara Z-tago, en simpatia etoso.

La okcitana lernejo restas malfermita por eventualaj E-staĝoj aŭ renkontiĝoj. Nepre profitenda propono en tiu vere agrabla okcitanejo!

**El Bordozo**

**Ni ne lasu la Laŭtulojn sen novaĵoj pri la peticio rilate al la leĝpropono n-ro 1550. La subskribitaj peticioj plu alvenadas el diversaj departementoj. Baldaŭ ni atingos la duan milon kaj denove al S-ro Savary ni pruvos nian malkontentecon pri la nerespektita promeso.**

Por havigi al vi petici-ekzemplerojn kaj por ilin resendi, turnu vin al : Ginette Gabillon, 32 rue Renault
33200 Bordeaux Caudéran.... sed ne al "Laŭte!" !

Dankon, la Bordozanoj.

***********************************************

*El "Anekdotoj pri Gabrovanoj" :*

** Gabrovano iris sur la tegmenton por ripari la televid-antenon. Sed mispaŝinte, li ruliĝis kaj falis teren. Dum la falado, kiam li pasis preter la fenestro de la kuirejo, li ekkriis al sia edzino :*
*- Hodiaŭ mi ne manĝos, kuiru nur por vi!...*

** Post koncerto, ĉirkaŭ fama kantistino amasiĝis multaj admirantoj por ricevi aŭtografon de ŝi. Lasta restis gabrovano.*
*- Ĉu ankaŭ vi aŭtografon volas ?*
*- Ne, mi petas... unu el la bukedoj, ĉar mi havas rendevuon kun mia amikino...*

** Edzino : La kuracisto preskribis al nia amiko Petrov tre severan dieton.*
*Gabrovano : Nun estas la momento inviti lin gaste!*

## VIVO DE "Laŭte!" * BILANCO 1983

**Kasbilanco** (en FF)

| | | | |
|---|---|---|---|
| Abonoj + Donacoj | 7991,16 | Eldonkostoj* | 6193,75 |
| Antaŭa saldo | | Afrankado | 2073,76 |
| (fine de 1982) | 5401,88 | Nova saldo | 5125,53 (en pĉk) |
| | 13393,04 | | 13393,04 |

*(inkluzive de 1000 FF, kontribuo al la pagado de "Julia")

Kvankam nia bulteno estas certe unu el la plej etkostaj, ĝia kaso estas sana. La kas-enhavo (nova saldo) reprezentas la jam ricevitajn abonojn por 1984 (239). Ni tamen devas de tempo al tempo alĝustigi la abonprezon al la eldon- kaj sendkostoj. Principe, ni "sekvas" la plialtiĝon de la afranko en Francio, tiel la abonprezo egalas **10** poŝtmarkojn por ordinara letero en Francio. Eventualan plialtiĝon ni decidos meze de 1984, se plialtiĝos la afranko.

**Abonantaro** : 368 abonoj en 1983 (+ 35 kompare kun 1982). La abonantaro ŝajne stabiliĝis en Francio, sed plu kreskis en aliaj landoj. Nun 32 % el la legantaro troviĝas ekster Francio (25% en 1982). Ĉar la prizorganto taksas je 500 la nesupereblan eldonkvanton, kiun li povos elteni, restas tamen bonvenaj ankoraŭ kelkaj dekoj da pliaj abonoj antaŭ ol devos stabiliĝi la abonnombro (je proks. 450, ĉar necesas pluraj dekoj da ekzempleroj por specimenoj, arkivo kaj leĝa depono). Notinde, ke 19 abonoj estis afable donacitaj de malavaraj legantoj por nepagipovantoj.

**Amplekso** : Aperis 6 numeroj kaj la adresaro, sume 262 paĝoj. La tuta kolekto estis ofsetita. Por la du lastaj n-roj ekfunkciis JULIA, nia nova helpilo, kiun multaj gratulis. La laŭdojn kompreneble meritas ĉiuj gemalavaruloj, kiuj ebligis la aĉetadon de JULIA. Pri la uzado de la etaj litertipoj - ne tre facile legeblaj de pluraj abonantoj - ni respondis en L! 51. Krome, intertempe alvenis jena sugesto : Kial ne ŝanĝi la desegnon de la kovrilpaĝo ? "Ĝi estas malbela, malgaja kaj similas koleran homon". Mi persone tre ŝatas tiun ĉi desegnon, sed volonte akceptos kaj uzos alia(j)n projekto(j)n, se iu havos ideon.

**Partopreno** : Paralele al la plimultiĝo de nefrancaj legantoj, iom post iom internaciiĝas nia bulteno. Nefrancoj nun partoprenas en la ĉenleteroj. Ni plu petas novajn geverkemulojn, por ke ĉiuspecaj vidpunktoj speguliĝu en "Laŭte!".

## SAT-BROŜURSERVO * Bilanco 1983 (en FF)

| | | | |
|---|---|---|---|
| Vendoj - Provizoj | 26011,65 | Eldonado | 22977,15 |
| Donacoj | 12867,40 | Afrankado | 4299,30 |
| Diversaĵoj | 904,70 | Aĉeto "HermèsS40" | 12632,56 |
| Antaŭa saldo | 8677,84 | Diversaĵoj | 2456 |
| | | Nova saldo | 6196,58 |
| | 48461,59 | | 48461,59 |

## VIA SITUACIO

| rilate al "Laŭte!" | | rilate al SAT-Broŝurservo | |
|---|---|---|---|
| abono finita (ruĝa kruco) dato de via abonfino | ☐ ☐ | en via konto { restas / mankas (-) | ☐ |

## SAT-BROŜURSERVO

**Komento pri la kasbilanco :** Ĝi estas nek detala nek ortodokse starigita (kiel rimarkigis al ni s-ro L.M.). "Diversaĵoj" temas pri transĝiroj de BS al L! aŭ inverse, kaj repago de prunto. Kvankam la donacoj tute kompensis la aĉetadon de JULIA, la bilanco aperigas deficiton. Tial ke parto el la "trezoro" utilis por eldoni novajn broŝurojn kaj ĉefe reeldoni 1000 ekzemplerojn de "Kiel diri", kies disvendado okazos nur iom post iom. Jen, por ke ĉiu havu etan ideon pri la aktiveco de SAT-BS en 1983, la listo, en kronologia sinsekvo, de la pasintjaraj eldonaĵoj/reeldonaĵoj : GE, UN, EH, MN, TK, LN, KI, TP, ES, DI, SA, US, EK, KK, BU, NL.

Do, de nun estas mendeblaj : "Komuna Kantareto", "Esperanto en 24 paĝoj por katalunoj", "La racia kaj ateista budhismo" (4FF), "Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo" de Leo Polak (3FF).

Intertempe, **elĉerpiĝis** : RS, HA kaj NA. Baldaŭ mankos "Kio estas SAT?". Ni konfirmas elĉerpiĝon de "Historio de SAT - dua parto".

**Venontaj eldonaĵoj** : "Jaro 2000" de Henri Muller, "Konstrui fajron" de Jack London, "Ĉu ni vere helpas la Trian Mondon" de Glyn Roberts.

**SED--nesufiĉa "klientaro" :**

Se ne kreskos la broŝurabonantaro (nur 80 abonoj en 1983!), ni devos draste redukti la eldonprogramon kaj same draste plialtigi la vendprezojn. Estus neracie plu gravigi la jam grandegan broŝurstokon, ĉefe per novaj tekstoj socipolitikaj, filozofiaj, literaturaj, el kiuj ne disvendiĝas pli ol 150 ekzempleroj, dum la eldonkvanto kutime estas 400 aŭ 500. Kompreneble, multaj fine elĉerpiĝantaj tekstoj ne estas reeldonotaj.

Feliĉe, regule venas mendoj de pluraj landaj E-libroservoj kaj de unuopuloj neabonantoj. Sed ankaŭ ĉi-flanke povus esti multe pli vasta la "klientaro" ! Ni povas nur esperi, ke la nova aspekto de la broŝuroj tajpitaj per JULIA favoros pli bonan funkciadon de la broŝurservo.

Kribo

---

Por fariĝi Broŝurabonanto ? Ĝiri minimume 100 FF-provizon.

************************************************

la venonta n-ro aperos komence de aprilo

Gérant-imprimeur : Baudé, 47340 LAROQUE TIMBAUT. CPPAP 58651

# ALIĜILO

## 57-a KONGRESO de S.A.T. en BORDEAUX
## 1.8 ĝis 8.8.1984

**Organiza KONGRES-KOMITATO:**

*Sekretario:* Léo ROBERT, 11 rue des frères Lumière, F 33150 CENON, Francio.
*Kasistino:* Micheline DEMONTOUX, 2 rue François Lévêque, Grand Parc, 33300 BORDEAUX, Francio
*Konto (poŝtkonto):* Congrès Esperantiste Intern, N-o 546912 N Bordeaux.

---

**Kongreskotizoj** (en FRANCAJ FRANKOJ)

| Aliĝo ĝis la | 1.3.1984 | 1.5.1984 | POSTE |
|---|---|---|---|
| S.A.T.-membro | 200 | 250 | 300 |
| S.A.T.-geedzoj | 320 | 400 | 450 |
| S.A.T.-gejunuloj 15 ĝis 28-jaroj | 100 | 120 | 150 |
| Gasto | 250 | 300 | 350 |
| Gasto-geedzoj | 400 | 450 | 500 |
| Gasto-gejunuloj 15 ĝis 28-jaroj | 120 | 140 | 170 |

Subtenantoj (laŭvole — sed kiu pagos almenaŭ 100 FF ricevos la kongresmaterialon)

---

**GRAVAJ ATENTIGOJ:**

— En la kongresejo la gastebleco estas limigita. Pro tio bonvolu ne atendi la lastan tempon por sendi vian aliĝilon; tiam ni ne plu povos garantii loĝadon, nek pensionon.
— Antaŭ ol plenigi ĉi aliĝilon konsilinde estas atente tralegi la duan kongreskomunikon (januara Sennaciulo n° 1 (944)), en kiu troviĝas ĉiuj necesaj klarigoj.

**Skribu PRESLITERE**

Familia nomo: K-do, K-dino .................................... Antaŭnomo: ..............................

Adreso (strato kaj n°): ..............................................................................

Urbo (kun poŝtkodo) .................................................. Lando: ..................................

S.A.T.-an(in)o* n°: ............................ Gasto*: ............................ Aĝo: ..................

Familianoj: Edzino (antaŭnomo) ................................. S.A.T.-membro* n° .................... Gasto*

Infanoj: .................................................................. Aĝo: ......................................

ĝis 15-jaraj aliĝo senpaga. * Forstreku la nekonvenan.

Mi(ni) tranoktos: Merkrede 1.8 ( ) - Ĵaŭde 2.8 ( ) - Vendrede 3.8 ( ) - Sabate 4.8 ( ) - Dimanĉe 5.8 ( ) - Lunde 6.8 ( ) - Marde 7.8 ( ).

Entute ............... noktoj por ............... personoj. × Signu la mendatan.

Mi(ni) tendumos jes — ne

Mi(ni) estas vegetarano jes — ne

Mi(ni) alvenos: per vagonaro — per propra veturilo — per aviadilo.

Antaŭvidata alventempo (tago kaj horo): ..............................................

Mi(ni) deziras organizi — ĉeesti fak- aŭ frakci-kunsidojn jes — ne.

Aliaj deziroj: ..............................................................................
..............................................................................
..............................................................................

En .................................................. la (dato) ..................................

Subskribo ..................................

## KALKULO

Mi(ni) kalkulas mian(nian) ŝuldon en FRANCAJ FRANKOJ

— **KONGRESKOTIZO(J):** .................... + .................... + .................... + .................... = ....................

— **GASTADO** (indikataj kostoj por UNU pers. dum UNU tago)

- Plena pensiono kun tranoktado en la kongresejo:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Kategorio A | 105 FF × | .......... pers. × | .......... tag. = | .......... |
| Kategorio B | 125 FF × | .......... pers. × | .......... tag. = | .......... |
| Kategorio C | 160 FF × | .......... pers. × | .......... tag. = | .......... |

- La tri manĝoj en la Kongresejo kun tranoktado en proksimaj hoteloj:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Kategorio D (dupersona lito) | 155 FF × | .......... pers. × | .......... tag. = | .......... |
| Kategorio E (du unupersonaj litoj) | 160 FF × | .......... pers. × | .......... tag. = | .......... |

- La tri manĝoj en la Kongresejo SEN tranoktado:

75 FF × .......... pers. × .......... tag. = ..........

- Tag- kaj vespermanĝoj en la kongresejo, SEN tranoktado, nek matenmanĝo:

66 FF × .......... pers. × .......... tag. = ..........

- Se unulita dormĉambro ne estas disponebla en la kongresejo mi pretas loĝi en hotelĉambro kun: ....................

— **EKSKURSOJ:**

A - DUONTAGAJ (elektu nur unu)

| | | | |
|---|---|---|---|
| - Saint Emilion | 45 FF × | .......... pers. = | .......... |
| - Blaye kaj norda Ĝirondio | 45 FF × | .......... pers. = | .......... |
| - La Brède, bastidoj | 45 FF × | .......... pers. = | .......... |

B - TUTTAGAJ (elektu nur unu)

| | | | |
|---|---|---|---|
| - Tra la vinregiono Medoc | 120 FF × | .......... pers. = | .......... |
| - Per ŝipo laŭ riveregoj Garono kaj Ĝirondo | 160 FF × | .......... pers. = | .......... |
| - Arcachon, kaj Duno en Le Pila | 160 FF × | .......... pers. = | .......... |
| - Tra la pinarbarego ĝis la ekologia rezervejo en Marquèze | 150 FF × | .......... pers. = | .......... |

(La ekskurso-prezoj inkluzivas veturadon, tagmanĝon kaj enirbiletojn por vizito)

— **KONGRESMARKOJ:** 5 FF × .......... fol. = ..........

(Unu 9-marka folio kostas 5 FF)

— **SUBTENKOTIZO** (eventuale) = ..........

— **SOLIDARFONDUSO** (eventuale) = ..........

Sume FF = ..........

**Grava rimarko:** La O.K.K. estos dankema se vi kiel eble plej frue pagos la ŝuldatan sumon, parte aŭ entute laŭ viaj eblecoj. Bonvolu sendi la aliĝilon kaj la pagilon en sama koverto al la sekretario:
k-do ROBERT Léo, 11, rue des frères Lumière, F 33150 CENON, Francio.

Geedzoj ricevos la kongresinformojn nur unuekzemplere.
Kiel aliĝdato validas la poŝt-stampo kondiĉe, ke dum la sama tago estos enpagata almenaŭ la kongreskotizo(j).
Kies aliĝilo venos post la 1-a de julio, al tiu(j) ni ne plu garantios loĝadon, nek pensionon.

Atentu: O.K.K. ne respondecos pri restado aŭ aliaj servoj al la aliĝintoj, kiuj ne detale kaj klare respondos niajn demandojn. Tial ne forgesu atente plenumi la aliĝilon.